

Vermuyten Hector, belgiano,  
urba oficisto. Nask. 1 okt. 1889 en  
Antwerpen. E-isto de 1922. Kirsgvi-  
danto. Deklamisto, premiita de la  
»Reĝa Flandra Konservatorio«, kaj  
uzas sian arton en la servo por E kaj  
por diskonigo de la flandra litera-  
turo. Kompilis kaj grandparte tradu-  
kis la flandran parton de la »Belga  
Antologio«, 1928, kaj verkis por ĝi  
historion de la flandra literaturo.

VERMUYTEN HECTOR (Antwerpen 1899) Belgo (flandra) Abituriento. Deklamisto  
~~diplomita~~ diplomita de la Reĝa Flandra Konservatorio (Antverpeno) Emer. sek-  
torestro de antverpena urba servo. Redaktoro de urbopersonara gazeto ne-  
derlandlingva (1949-1963) Esperantiĝis en 1922. Fakdelegito de UEA. Kurs-  
gvidanto / <sup>publikigis</sup> kaj komitatano de la antverpena grupo "La Verda Stelo" Nun vic-  
prezidanto pro honoro. Premiĝis en tiamaĵ "Katalunaj ~~Floraj~~ Floraj Ludoj"  
Kompilis kaj grandparte tradukis la flandran parton de la "Belga Antolo-  
gio" (1928) kaj verkis por ĝi historion de la flandra literaturo (kiel su-  
dan parton de tiu de la nederlanda lingvoteritorio) Prizorgis tradukon de  
poemkolekto "Se Aŭskultas la Animo" de la flandra poeto Guido Gezelle (1850-1899) Aperigis recenzojn, artikolojn sed precipe tradukojn de neder-  
landlingvaj poemoj en diversaj revuoj, i. k. "Belga-, Flandra-, Nederlanda-,  
Svisa Esperantisto", "Literatura Mondo", "La Pirato" kaj "Espero Katolika".  
Verkis originale spritajn, ironiajn kaj porcirkonseancajn versaĵojn / Ana-  
grama ps. Tyneverum aŭ Tyn. Tradukis kaj <sup>publikigis</sup> ~~aperigis~~ plurajn esperantajn  
poemojn.  
*[nederlandlingven]*